

# ESPERO KATOLIKA

Oficiala monata organo de la Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista (I.K.U.E.), fondita de Abbé Richardson en 1910 en Parizo.

Redakcio kaj Akministracio Espero Katolika-VLEUTEN (Utrecht), Nederlando

Kunlaborantoj: d-ro E. J. Görlich (Aŭstrujo), Robert Ernst, sac. (Belgujo), Ludwig Thalmaier, sac. (Germanujo), J. Vernoux, sac. (Francujo), Eusebio Maynar (Hispanujo), Prof. H. G. Wannemakers S. J. (Indonezio), G. Ellerman kaj d-ro W. J. A. Manders (Nederlando), d-ro W. Solzbacher (Usono).

## M A R I A

Kaj estis nokto ... mallumego ĝia  
per la nebuloj pliprofundigita;  
Eĉ unu lumradio eta  
ne igas tristan ludon malbonharmonia  
Sed tamen vidu steleto aperas!  
Ne estas stelo, sed la suno mem!  
Jam povas kreski, ĝermi Dia sem'  
ĉar kien venas, ĉion tuj konkeras  
Maria! Maria! Maria!

Samtempe kun la aloj de anĝelo  
io pretera ombas Vin.  
Ne timu Sankta Virgulin';  
Spirito jen en Via ĉelo  
ho, venis teren la ĉielo  
kaj estas fino de malĝoj  
Homaron estras rekta voj  
kiu alia ol patrino nia  
Maria! Maria! Maria!

Senlima, vere senanalogia  
la amo estas de patrin'.  
Kaj serĉu ĝis la mondfin'  
jen ne ekzistas io plia  
Kaj tiu amo estas mia!  
Fortege mi posedas ĝin.  
Mi ankaŭ estas fil' de in'  
kaj ŝio nomo super ĉiu homo  
Maria! Maria! Maria!

Kaj tamen kial ŝin prikantas  
estaĵoj sur ĉiel' kaj ter'?  
Kia do estas la mister'  
kiu ŝin tiel plialtigas?  
Respondo estas glora melodio.  
Ĝin kantas ĉiu birdo, florfolio  
ke estas ŝi de homarsav' medio;  
kaj Diinfano krucumita Amo  
Jesuo - estas filo de M a r i a !

verkis

Vàclav Duroň

je la festotago de S-ta Maria, helpantino de ĉiuj Kristanoj.  
24-5-51.



Jen ni havas la okazon al vi prezenti poemon de Mezeŭropan poeton. La orientaj kristanoj estas fervoraj honorantoj de la Dipatrino. Preĝu ni dum la monato Majo por ke per la helpo de Maria baldaŭ al ili estos eble honori Ŝin laŭ deca maniero en la tradiciaj lokoj. Al tiuj lastaj speciale estas aldona la ambasadora preĝejo de Francujo en Moskova, kie sin trovas statuo de Nia Sinjorino de Fatima, statuo benita en la pilgrimloko en Portugalujo.

# **PROGRAMO de la XXXVa INTERNACIA EŬKARISTIA KONGRESO**

## **en BARCELONA.**

**Mardo 27 Majo:** Malfermo de la Kongreso. Posttagmeze akcepto de Lia Kardinalo Moŝto Tedeschini, legato de la Papo. Nokta adorado en la Baziliko de la S-ta Koro sur la Tibidado.

**Merkredo 28 Majo:** EŬkaristia tago por la paco de ĉiu individuo kaj en la familioj. Matene pontifikaj sanktaj mesoj kaj S-ta Komuniĝo de la infanoj. Laborkunsidoj de komisionoj. Posttagmeze laborkunsidoj naciaj. Pastrara horo en la preĝejo de S-ta Jozefo. Solena kunsido de la akademio.

**Ĵaŭdo 29 Majo:** EŬkaristia tago por la paco en la asocio Matene sanktaj mesoj por la malsanuloj kaj la persekutitoj en la tuta mondo. La sankta sakramento estas solene portata tra la silenta urbo al la malsanuloj en iliaj loĝejoj kaj en la hospitaloj. Vizito al la malsanuloj kaj al la mizeruloj. Laborkunsidoj. Posttagmeze honorigo de Kristo Reĝo de la laboristoj. Solena akademia kunveno. Prezento de religia spektaklo.

**Vendredo 30 Majo:** Internacia EŬkaristia Tago. Matene pontifikaj solenaj mesoj kaj S-ta Komuniĝo de la virinoj kaj knabinoj. Laborkunsidoj. Petego de ĉiuj popoloj por la paco en la mondo. Solena akademia kunveno. Spektaklo pri la S-ta Sakramento.

**Sabato 31 Majo:** EŬkaristia porpaca tago por la unueco en la S-ta Eklezio. Matene ĝenerala beno de la sacerdotoj. S-taj mesoj en diversaj ritoj. Sekciaj laborkunsidoj. Posttagmeze solena akademia kunveno, kaj sekve en ĉiuj preĝejoj de la urbo predikoj por prepari la meznoktan meson kun S-ta Komuniĝo de la viroj. Intenco: la paco de Kristo en la socia vivado.

**Dimanĉo 1 Junio:** (Pentekosto) Pontifika Solena S-ta Meso de la Kardinalo-legato. Posttagmeze procesio de la S-ta Sakramento. Poste solena fermo de la kongreso kun preĝoj por la Papo, la Eklezio kaj la mondo, beno de la Kardinalo legato kaj alparolo de Lia Papa Moŝto Pio XII pere de la radio.

**Lundo 2 Junio:** S-ta Meso de dankdiro por la mortintoj en la sanktejo de Nia Sinjorino de Montserrat, patronino de la Kongreso.

Partoprenantoj esperantistaj devas fari la vojaĝon kun la nacia pilgrimaro. Ili estas petataj sendi sian adreson al f-ino Maria Jung, Avda Jose Antonio 470, Barcelona (Hispanujo), kaj al nia prezidanto sac. A. Beckers, Overpeit-fabriek, (Belgujo). Ili ricevos sciigon pri dato kaj loko de la esperantaj kunvenoj.

### **INTERNACIA KONKURSO por poemoj pri la S-ta EŬkaristio.**

La Ekzekutiva Komitato de la 35a Int. EŬk. Kongreso ellaboris detalojn pri internacia konkuro por poemoj pri la S-ta EŬkaristio. Povas partopreni personoj de kiu ajn nacio en kiu ajn lingvo. La verko ne estu ankoraŭ eldonita. La unua premio estas ora medalo kun 5000 pesetoj, la dua estas argenta medalo kun 2500 pesetoj. Diversaj aliaj premioj estas donacitaj de la Kardinalo primato de Hispanujo Enriko Pla y Deniel, de la episkopo de Barcelona Mons-ro Gregorio Modrego y Casaus, de la Ekzekutiva Komitato, de la Nacia Ligo de Katolika Agado.

La verkoj devas esti ĉe la prezidanto de la Ekzekutiva Komitato je la 31a de Majo 1952a. La juĝantaro konsistas el la Patriarko de Okcidenta-Hindio L. Eijo y Garay, episkopo de Madrid kun la titolo de episkopo de Alcala de Henares, la prezidanto de la Hispana Instituto kaj iu profesoro de la Reĝa Hispana Akademio. Por la diversaj landoj kaj lingvoj oni aldonos fakulojn. Kiel informado la Komitato donas la jenajn temojn: Himno alla EŬkaristio - La S-ta Virgulino kaj la EŬkaristio - La EŬkaristio kaj la Paco - La Eukaristio kaj la persekutoj de la Eklezio - La beata Papo Pio Xa, papo de la EŬkaristio - La EŬkaristio kaj la Infano - EŬkaristiaj sanktuloj. Ni esperas ke ankaŭ Esperanto estos aŭdata en la ĥoro de lingvoj, laŭdantaj Kriston Reĝon en la EŬkaristio.

## URBO DUM JARCENTOJ



Mikaelo de Cervantes skribis en sia 'Don Kihoto' la plej bonan laŭdon pri la urbo: 'Fonto de ĝentileco, rifuĝejo de fremduloj, hospitalo de malriĉuloj, venĝo de la ofenditoj, scianta respondi agrable al la veraj amikecoj, kaj rilate situo kaj belo, unika'. Kaj hodiaŭ, post tri jarcentoj, tiu laŭdo de la fama verkisto ankoraŭ estas tre justa.

La geografia situo de Barcelona estas vere privilegia: la urbo etendiĝas en fekunda ebenaĵo, inter la riveroj Besos kaj Llobregat kaj la montoj de Tibidado kaj Montjuich. La malnova centro de la urbo malsupreniras lente al la Mediteraneo. En ĉi tiu natura kadro la homoj sin kreis grandan urbon. La primitiva centro estas la koro de la urbo, ĉirkaŭ kiu arangiĝas la grandaj stratoj kaj placoj, speciale la Placo de Katalunio, fama pro ĝiaj belaj proporcioj. Sur la deklivoj de Montjuich, kun la belaj parkoj kaj ĝardenoj, en la vesperoj la lumetoj de amuzejoj Ĥriletas super la urbo, sin melante kun la muziko. Kontraŭe la Paseo de Gracia kaj La Granda Vojo Diagonala formas kontraston kun sia sinjora sinteno.

Rilate la originon la historio de Barcelona estas tre konfuza. Laŭ onidiroj la urbo estis fondita de la greko-funicianoj kaj de la kartaganoj Amilcar Barca. Kio estas, dum la romana imperio la urbo estis tre signifa. Komence de la 5-a jarcento ĝi estis dum mallonga tempo la korto de la gota reĝo Ataulf. Poste ĝi travivis teruran krizon dum la islama invado. Kiam la kristanoj denove organizis la landon malantaŭ la Pireneoj, Barcelona fariĝis baldaŭ unu el la gravaj graflandoj de Katalunio. Ĝia sorto estis kunligita kun tiu de la korto de Reĝo de Aragon. En la mezepoko la urbo estis inter la plej signifaj havenoj de la Mediteraneo. Kaj en niaj tagoj ĝi estas la plej granda haveno kaj industria urbo de Hispanujo. Kun la antaŭurboj ĝi nombras unukaj kvarona milionoj de loĝantoj.

Al la vizitantoj la urbo prezentas diversajn artistikajn monumentojn. Ekzistas en Barcelona tuta kvartalo gotika, kun speciale la katedralo, dediĉita al S-ta Eŭlalia, kies skulptita tombo estas en la interno. Vere vidindaj estas diversaj aliaj preĝejoj, palacoj kaj oficialaj konstruaĵoj, kiel la urba domo, la salo de la deputitoj, ktp. Speciale ni ankoraŭ atentigas la preĝejon de la S-ta Familio, konstruita en la modernaj tempoj de la arkitekto Gaudi. Ĝi meritas esti menciata pli pro sia strangeco ol pro sia beleco. Krome la konstruado ne finiĝis.

Estas tro eĉ nomi ĉiujn museojn, k.e. la Kataluna Museo de la Belaj Artoj, de la Modernaj Artoj, de la Maristoj, la Museo Historia, ktp., ktp.

En la ĉirkaŭaĵoj oni trovas multajn vidindajn lokojn kun apartaj historioj. Ni nur elektas por nomi Tarrasa kun ĝiaj antaŭromanaj kaj romanaj postrestoj kaj finfine, ĉiu kiu vizitas Barcelona nepre devas pilgrimi al Montserrat, monaĥejo de la Benediktanoj, centro de religia kaj kultura vivo de Katalunio, kaj famkonata pro la honorigo de la S-ta Virgulino.

La libro 'Spiritaj Ekzercadoj' estas havebla ĉe nia libroservo.  
Prezo f 0.85 al pk. 252792 de L.G.C. de Jong en Vleuten. Oni povas pagi ankaŭ al niaj reprezentantoj.  
Ankaŭ kontraŭ ensendo de 5 Int. resp. k. MENDU TUJ!

## G R A V A E L D O N O !

S. Ignacio de Loyola: Spiritaj Ekzercoj. Rekte tradukitaj el la hispana originalo laŭ eldono de 'El Mensajero del Corazón de Jesús'. Trad. Eŭma. Zaragoza (Hispanujo). 1952. 9 x 13 p. 206 broŝurita.

Jen la esperanta traduko de grava verko, pliriĉiganta la serion de katolikaj dokumentoj en la mondlingvo. Ni admiras la grandan kuraĝon de la tradukinto, ĉar li entreprenis malfacilegan laboron. Ne nur la stilo de la aŭtoro estas tre persona, sed ankaŭ la verko posedas tre propran karakteron.

Estas multe pli facila laboro traduki la aŭtobiografion de la sama Sanktulo, kies teksto krome estas ĉarma legaĵo por la Esperantistoj. Ĉi tie tamen ne temas pri legolibro, eĉ ne pri studolibro! La Spiritaj Ekzercoj de sankta Ignaco nur estas programo, instrukcio por spirita agado. Pro tio la leganto ne seniluziĝu: la libro ne supozas leganton, sed aganton, kaj kun gvidanto!

En multaj lokoj la traduko montras ke la tradukinto serioze penadis pesi la vortojn, konsideradis la nuancojn kaj ofte li fidele kaj lerte redonis la intencon de la aŭtoro. Pro tio estas tiu ĉi simpla kaj plaĉa eldonaĵo pliriĉigo de nia tutmonda literaturo.

Kaj pro la enhavo, kaj pro la terminaj problemoj la libro povas doni elirpunktojn por pluaj asketaĵoj studoj, krome koncerne la terminaron ĝi ofte prezentas feliĉajn solvojn.

El tiu ĉi sincera laŭdo la atenta leganto eble jam ekscias ke ni krome havas niajn dezirojn. La traduko ne estas tiel senripoĉa ke ĝi taŭgas en ĉiuj lokoj por citi la ĝustan tekston de la originalo, ankaŭ la esperanta lingvaĵo enhavas malĝustaĵojn kaj erarojn. Kvankam en multaj lokoj oni vidas nur kelkajn prezerarojn, en kelkaj ili abundas, komparu n. 135: kontrŭe, kiama - niero, kium.

Koncerne la nomon de la aŭtoro ni preferus Ignaco anst. Ignacio, por konservi la akcenton sur a, kaj por eviti la jam troigitan uzon de la litero i, ni nur uzu tiun i ekz., kie ĝi en la greka originalo estas longa, kiel en Basilio. La tradukinto ne ĉiam uzas la saman vorton por la sama koncepto, dum temas pri termina precizeco: foje li uzas ekzerco, foje ekzercado, tiel kontempli kaj kontempladi, mediti kaj meditadi. Ni preferus en ĉiuj tiaj kazoj la simplan formon: ekzerco, kontempli, mediti, kiuj ĉiuj sen speciala kialo ne bezonas - ad-, tiel ankaŭ en la titolo: Spiritaj Ekzercoj.

Oni evitu -ul- post verbaj radikoj, kiel kontemplulo, ekzerculo, ĉar -ul- indikas la posedanton de iu eco, kaj ne aganton. Anstataŭe oni uzu ekzercanto, kontemplanto. Foje komplikaj formoj ŝajnas nenecesaj: serĉataĵon (n. 11) anst. serĉaĵon; sene de ĝi (n. 14) anst. sen ĝi; diservistecon (15) anst. religian staĵon; kompatemagoj (19) anst. kompataj faroj; kaŝate (20) anst. kaŝe; interparoladeto (61 k. a.) anst. interparolo; dezirotajon (72) anst. deziraĵon; iajn fojojn (113) anst. foje. Ofte oni trovas la uzon de la artikolo kune kun sia, tiu, k. s. ekz. (16) 'la tutajn siajn', kio estas superflua. Foje mankas la artikolo, kie ĝi necesas ekz: Mi estas reviviĝo kaj vivo (285, 2a) nepre estu: Mi estas la reviviĝo kaj la vivo.

Foje oni rimarkas iun mankon rilate la signifon de la Esperanto-vortoj: sciagado (2) ne estas la sama kiel 'abundeco da scio', kion S. Ignaco intencas; ĉar (4, 39) estas uzata anst. kvankam; alesti (20) anst. ĉeesti aŭ apudesti; rapidire (14) estu trorapide; 'personan postenon kaj ulemon' (14) estu 'propran situacion kaj personecon'; kiel ankaŭ la tradukinto aprobas la tradukon de la hispana vorto 'subiecto' per personeco en n. 18 'Li lasu senpere ke la Kreanto agu (15) estu: 'Li lasu ke la Kreanto senpere agu'; 'ke la Kreanto kaj Sinjoro mem komuniku' estu: 'ke la Kreanto kaj Sinjoro Sin mem komuniku', laŭ traduko de la hispana: 'que el mismo Criador y Señor se comuniquen'; 'la kreitaĵo kun ĝia Kreanto' estu: 'la kreitaĵo kun lia Kreanto', ĉar temas nur pri la homo kiu faras la ekzercojn.

El la lastaj rimarkoj kiuj ĉiuj apartenas al n. 15 oni vidas, ke estas maleble indiki ĉion rimarkindan per ĉi tiu recenzo. Tamen en la libro de S. Ignaco ĉiu vorto estas intence skribita. Kiel la rimarkoj montras, tiuj eraroj ofte ŝanĝas la signifon de la frazo.

Foje mankas la subjekto tiel ke oni ne povas ĝin facile aldoni: (20)

'Al plej senzorga' estu: 'Al (homo) plej senzorga (t. e. sen negocoj)'. Kaj je la fino de la sama (20): 'ju pli tiel ... des pli sin' estu: 'ju pli ĝi tiel ... des pli ĝi sin'. La ekzemplo ankaŭ montras kiel la forlaso de la multaj eksplikaj notoj de Patro J. Roothaan S.J., kaj de la Enkonduko de la Spiritaj Ekzercoj kaŭzas, ke multaj tekstoj malfacile povas kompreniĝi.

Tiel ankaŭ en (31) la foresto de la desegnaĵo - montranta sep parojn de horizontalaj linioj sur kiuj oni povas dufoje ĉiutage indiki la punktojn de la ekzameno, tiel ke la figuro sufiĉas dum unu semajno - kaŭzas ke la indiko ĝ- estas preskaŭ nekomprenebla.

En (20) oni legas: tera prizorgo, ĝi estu prefere: pritera zorgo. En la sama numero la ekzercondonanto estas indikata per 'oni', la prenanto per 'oni' kaj 'li', kio estas erariga.

Ofte oni trovas la vorteton 'tio' por indiki frazparton, kiu funkcias kiel subjekto, tiel en (20): 'estas la unua tio ke', ofte 'tio' ŝajnas superflua. Sed se oni uzas ĝin, oni evitu en (39): 'estas avertinde tio ke', kio estu: 'estas rimarkinda tio ke', ĉar tiukaze la uzo de 'rimarkinda' estas adjektiva. 'Averti' tamen oni nur povas uzi en la signifo: 'averti iun'. La malĝusta uzo de averti ankaŭ alie troviĝas, kp. (115), kie oni anst. 'rigardi, averti' prefere diru: 'atenti, rigardi'; tiel ankaŭ (127).

Tre grava miskompreno montriĝas en (114); 'gápante' estas la traduko de la hispana: 'contemplándolos'. Vi vidu en P.V. sub 'gapi': 'senpense, naive kion stulte rigardadi, malfermegante okulojn k buŝon! Kial ne simple traduku la hispanan per 'kontemplante'? Estas malfacile traduki la hispanan 'la salud espiritual' (16), ni preferas: 'la spirita savo'. La spirita savo ŝajnas nesufiĉa, kaj ne indikas la rilaton kun 'Savanto'. En (14) ni preferas 'movi' anst. 'peli', kio lasta ne tiom indikas respekton de la propra respondeco de la elektanta homo. Vidu 'movi' en (15). Anst. 'sanktan promeson' ni jam posedas 'voton'; la hispana 'continencia' ni ne povas traduki per 'ĉastecon', kiu ankaŭ implicas la laŭleĝan uzon de la genera povo.

'venko' (13) estu 'terenĵeto', kiel traduko de la hispana: 'derrocalle'. En (23): 'do ni devas indiferentiĝi por ĉiuj kreitaĵoj', pli bone ŝajnas: 'pri kvankam Zamenhof mem foje tiel uzis 'por'. (23): 'de tio kion kapablas nia libera volo', estu: 'de tio kio estas permesata al nia libera volo', kp. la hisp.: 'lo que es concedido a'. Anst. la uzo de 'antaŭparolado' (45, 47, k. s.) ni preferas 'enkonduko', ĉar ne temas pri parolado; ĝuste je la fino oni diras: 'interparolo'.

La esprimo 'ek de naŭ monatoj' (III) ŝajnas malĝusta, ĉar ek de indikas momenton, naŭ monatoj tamen tempospacon. Do preferinde estas: 'dum naŭ monatoj'. En la sama numero: 'servantino portante bovon' pensigas pri 'forta virino', ĉu ne? Ni preferas: 'kondukante bovon'. Pri tributo estas dirata tie: 'kiun la Cesaro trudis al la tuta tiu lando'; laŭ la signifo de 'altrudi ion al iu' la lando ricevos la tributon, kvankam certe kontraŭ la intenco de la Cesaro. Oni preferu: 'kiun la Cesaro postulis de tuta tiu lando' aŭ: 'al kiu la Cesaro devigis tutan tiun landon'.

(112) diras: 'tra valoj kaj deklivoj'; oni preferu: 'tra valoj kaj trans deklivoj', ĉar ne temas pri tuneloj.

(101) 'Enkorpigo', la esprimo 'Enkarnigo' jam estas ofte uzita kaj ankaŭ troviĝas en P.V., tiel 'enkorpigata' (109) estu 'enkarniginta'. (48) parolas pri 'relevigon', kio estu 'levigon', sed pli bone kaj pli uzita estas: 'revivigon' de (78). Tiel en (50, 51) 'rememori' estu 'memori'. 'Verbo' kiel neologismo estas superflua, 'Vorto' sufiĉas kaj estas jam uzita.

La difino de 'kontempli' kiel nova radikoj (p. 6) ne indikas la diferencon inter kontempli kaj aliaj preĝmanieroj. En (103) oni trovas: 'aparte la urbon Nazareton', tio estu: 'aparte por la domo kaj apartamentoj de nia Sinjorino en la urbo Nazareto', kaj oni forstreknu tiujn vortojn el (104). Tiuj ekzemploj sufiĉu por justigi nian juĝon. Restas nia laŭdo sincera kaj nemalgranda, ĉar legante la libron ni ofte pensis: 'Ĉu nia Esperanto jam sufiĉe evoluis kiel religia lingvo por la fidela esprimo de ĉiuj nuancoj de la spirita vivo. Ni dubas pri tio. Granda tasko restas farendata. La tradukinto donis al ni gravan helpon. Krome li konigis tre gravan verkon al la Esperantistaro!

H. G. Wannemakers S. J.





Je la 15a de Aprilo 1452 naskiĝis en la urbeto Vinci, sur la deklivoj de Monte Albano, proksimume 30 km. okcidente de Firenze, tuj apud la rivero Arno, knabeto, kiu iĝos unu el la plej eminentaj homoj. Li estis la neleĝa infano de Ser Piero 25-jara notario kaj knabino, nomita Caterina, ambaŭ en la domo de la avo Antonio di Ser Piero. La viro kaj la virino ambaŭ edziĝis alian personon, sed la knabeto restis kun la patro, kies edziĝo restis sen infanoj. Je la bapto li ricevis la nomon Leonardo.

Plej multaj homoj nur konas lin kiel la pentristo de la 'Mona Lisa' en la museo Louvre en Parizo.

La portreto reprezentas Lisa di Antonio Maria di Noldo Gherardini. Aliaj ankoraŭ scias ke li pentris la mondfaman 'La lasta Vespermanĝo' en la refektorio de la monaĥejo Sankta Maria de la Gracio en Milano. Jam Goethe diris ke ĉi tiu pentraĵo estis la plej granda verko de la mondo. Bedaŭrinde la murpentraĵo sin trovas en mizera stato pro la atakoj de la tempo, restoracioj, milito, ktp. Kiel pentriston oni nomas lin samtempe kun Rafael kaj Mikelaĝelo. Li estis tamen pli ol pentristo, Li eltrovis la flugmasinon kaj eĉ la helikopteron (nur al li mankis la sufiĉe forta motoro por realigi la planon). Li estis arkitekto, matematikisto, sciis perfekte la anatomion, la dinamikon, la hidromekanikon, la optikon, la akustikon, la astronomion la geologion, la botanikon, la fiziologion, ktp., ktp. Li estis vere universala homo.

Pli ol mil libroj jam aperis pri li, kaj tri grandaj institutoj en Italujo ĉiam jam daŭrigas esplorojn pri lia verko. Kun ioma certeco la moderna artkritiko atribuas al li dekdu pentraĵojn. El ili sin trovas kvar en la museo Louvre en Parizo, du en Firenze, du en Milano, unu en Romo (Vatikano), unu en Vieno unu en Leningrad kaj unu en Krakau. La granda murpentraĵo en la 'Salle delle asse', en la kastelo Sforzesco (sinjoroj de Milano) ne estas plu rekonebla post la restoracio de 1901. Tamen el desegnaĵoj de Leonardo kaj de Rubens oni povas imagi, kiel ĝi estis. Sur la pentraĵo sin trovas la kavalira statuo de Lodoviko Sforza. Leonardo da Vinci komencis sian karieron kiel skulptisto, lernanto de Verrochio. Ke li neniam povis fini la statuon verŝajne estis la plej granda seniluziigo de la majstro. Se li ne postlasis tiom da bonegaj, desegnaĵoj, ni certe ne scius kion li volis esprimi per sia arto. Multe da tiuj desegnaĵoj estas lokitaj en liaj manuskriptoj. Kaj determini la aliajn estas facila tasko, ĉar per la plumo, kraĵono kaj argentgrifelo Leonardo laboris maldekstremane, kaj li strietis do renverse ol preskaŭ ĉiuj aliaj artistoj.

Dum preskaŭ kvardek jaroj li skribis la rezultojn de liaj esploroj kaj provoj. En 1600 (li mortis en Majo 1519) la skulptisto Pompeo Leoni kompilis dek foliumojn en la 'Codice Atlantico'. En ili estas 1700 desegnaĵoj, sur 400 paĝoj. Deĉefri la manuskriptojn estis malfacila tasko, Oni eĉ dubis ĉu Leonardo ne uzis sekretan lingvon por ŝirmi sian personon, ĉar li estis tre progresiva. Sed poste oni eltrovis, ke kaŭze de lia maldekstramana laborado, per la helpo de simpla spegulo oni povis legi la vortojn. La 'Codice Atlantico' nun estas en la honora salono de la Ambrosiana en Milano. La diversaj aliaj partoj de liaj manuskriptoj estas en la Instituto de Francujo en Parizo, kaj en la biblioteko de la angla reĝo en Windsor. Liajn lastajn jarojn li trapasis en Francujo, ĉe la reĝo Francisko I. Por li Leonardo konstruis la kastelojn de Blois kaj de Chambord apud la rivero Loire. Tie li mortis je la 19a de Majo 1519a en Amboise, fortigita de la sanktaj sakramentoj. Post lia morto hirundo venis en la ĉambro, sidigis sur la lito kaj sur la mano de la mortinto. Dum sia vivo Leonardo ofte aĉetis la birdetojn de la foiro por doni al ili la liberecon. La reĝo Francisko ploris, eksciante la morton de la genio, kiu tiel favore servis lin. En tiu tempo oni nur ŝajne estis pli kruela ol nun. Ofte oni militiris, sed tamen oni prenis sufiĉe da tempo por servi al la laboroj de la paco kaj reĝe re komencis la reĝan spiriton. Nun ni prenas sufiĉe da tempo por rui-nigi la laborojn de la paco kaj intertempe ni daŭre preparas tion, tiel la reĝa spirito mizeras kiel proleto.

## LA PLUGILO DAŬRE TIRAS SIAJN SULKOJN!

La jam anoncita kongreso beneluksa de 'La Estonto Estas Nia' kaj 'La Flandra Ligo Esperantista' dum la venontaj Pentekostaj tagoj ne okazos en Antverpeno sed en Rotterdamo. \* \* \*

Dum la samaj tagoj kongresos la danaj esperantistoj en Vejle la britaj esperantistoj en Newcastle-upon-Tyne; la Belga Esperanto Ligo en Bruĝo; la svedoj en Stockholm; la Laboristaj Esperantistoj en Putten (Nederlando). En niaj preĝejoj ni alvokos la Sanktan Spiriton, kiu efikis la unuan lingvan miraklon en Jeruzalemo, por ke Li inklinu la korojn de la homoj por ke la laborado deniaj ŝamideanoj ne estu vana. \* \* \*

Gis la 31 de Marto sin anoncis por la Universala Kongreso en Oslo 1070 partoprenantoj el 28 landoj. Kronprinco Olav akceptis la patronecon. \* \* \*

En Hamburgo 250 policianoj sekvis esperanto-kurson dum la deĵorhoroj. \* \* \*  
La Radio-servo de NCKE en Tjerkwerd (Nederlando) sendis sian materialon pri la horoj de esperanto-elsendoj al ĉiuj naciaj radio-programoj, kiuj represigis ilin je regulaj tempoj. Tio servo bone efikas! \* \* \*

La universitato de Lund (Svedujo) uzas Esperanton por esplori la kutimojn, ktp. pri la buĉado de ĉevalviando. \* \* \*

Okaze de la grava politika konferenco de la NATO en Lisbono, ĉefurbo de Portugalujo, en la kadro de la Atlantika Akordo, la Portugala Esperanto-Asociodisdonis al ĉiuj partoprenantoj de la konferenco kvarlingvan cirkuleron pri la eblecoj de komuna artefarita lingvo, speciale pri Esperanto. \* \* \*

Per speciala letero al la estroj de instruado en la provincoj italaj, la Ministro de Publika Instruado forte instigas al la disvastigo de la kono de Esperanto. Li permesas ke la lernejoj ĉambroj estu je la dispono de la lokaj grupoj kaj kursoj, por la teknikoj de la instruado la ministro proponas interrilati kun La Itala Instituto de Esperanto (Firenze, via dei Neri 6). Gratulon pro la sukceso! \* \* \*

La Usona 'Atak-armeo' ĉefstabejo (t.e. taktika sekcio de la armeo ĉe manovroj) akceptis Esperanton por sia servo. Ni ne volas nei la valoron de tiu kono de nia lingvo, kaj kvankam tiu atak-armeo ne estas serioza, ni arde atendas la komunikon, ke la 'State-Department' (Ministerio por Eksterlandaj Aferoj) en Washington proponis al la UNO ke Esperanto estu la komuna lingvo de la pacbatalantoj. La efiko estos certe pli granda. Ĉiutage Eŭropo ankoraŭ suferas pro la amikecoj, fonditaj dum la krucmilito en Hispanujo (1936) en la Internacia Brigado. Tie oni ankaŭ uzis Esperanton. Nun vidu la rezultojn por Esperanto en Sovjetujo, Ĉeĥoslovakujo, Polujo, Hungarujo, ktp. Armeaj lingvoj devas esti sekretaj. Por tio Esperanto ne taŭgas; almenaŭ ne en naciaj staboj. La aferoj ŝanĝos se ekzistos vere internacia UNO-armeo. Esperanto povos esti valora por la simplaj soldatoj!

### EL NIA RONDO

En Aŭgusto venonta SAT kongresos en Düsseldorf (Germanujo). SAT per Esperanto propagandas la Marksismon kaj Liberpensemon, la Sennaciecon kaj la Ateismon. Tial la germana katolika ligo, sekcio de GEA ne kunvenos dum tiu kongreso. \* \* \*  
kaj ne organizos katolikan diservon kun preĝo kaj prediko.

En Japanujo nun estas landa ligo de I.K.U.E. Kiel ĝenerala estrarano funkcios s-ro Maturba Hatirò, Naumatu-tyô 24 en Kisiwada. \* \* \*

Ni esperas baldaŭ, jam eble en la venonta numero, raporti pri nova landa ligo en Hispanujo. \* \* \*

Lau onidiroj la Universala Kongreso en 1953 estos en Amsterdam.  
Se tio vere okazos, la katolika kongreso ankaŭ estos en Nederlando.  
Eble ni povos raporti en la venonta numero.

## FERIAJ TAGOJ en KATOLIKA RONDO

La katolikaj flandraj esperantistoj en Bruĝe organizos je la semajnfino 9-10 Aŭgusto 1952 belajn tagojn.

La programo estas:

1. Interkonatiĝo kun la Bruĝaj Esperantistoj.
2. Vizito al la sonĝemiga Venecio de la Nordo kun ĝiaj antikvaj konstruaĵoj, pitoreskaj kanaloj. Boatveturado inter la historiaj partoj de la urbo. Promenado dumvespere tra la fabela lumigado.
3. Ĉeesto de la subĉiela prezentado de 'Sanguis Christi' (Sankta Sango-Ludo) kun ĝiaj 2.500 aktoroj antaŭ la majesta Belfrida-turo.
4. Kostoj:
  - A. Mezranga hotelo: po nokto kaj persono 75 Bfr. kun matenmanĝo (sen trinkmono).
  - B. Ĉeesto al SANGUIS CHRISTI: tre bona sidloko 75 Bfr.
  - C. Boatveturado: 20 Bfr.

Ni nur enskribas tiujn, kiuj pagas por la loĝado kaj la aranĝoj.


En Belgujo al: pk. 146091 de s-ro Et. De Baets-ASSEBROEK apud Brugge.

En Nederlando: pk. 252792 de L.G.C. de Jong en VLEUTEN kontraŭvaloro de

En aliaj landoj ĉe la perantoj de E.K. 95 Bfr.+ tranoktoj.

La organizantoj nur povas garantii la loĝadon kaj la sidlokon, se vi sendas vian sciigon kaj pagon antaŭ la fino de Majo. Ni varme rekomendas vian partoprenon!

## RADIO - PROGRAMO



- Majo 2: Respondoj al la geaŭskultantoj (prof. Musella)  
7: Cremona, la naskiĝloko de la violo (prof. Blasimme)  
9: 'Infero' de Dante. Komento pri la 33a kanto (prof. Musella)  
14: La italaj komponistoj: Riccardo Zandonai (prof. Blasimme)  
16: Itala Literaturo: S-ta Katarina el Sieno (prof. Musella)  
21: Fabeloj de la tuta mondo. Germanaj fabeloj.  
23: 'Infero' de Dante. Komento pri la 34a kanto. (prof. Musella)  
28: Programo por geknaboj: 'Pinokjo' V. sceno.  
30: La parolarto antaŭ la publiko kaj ĉe la mikrofono (prof. Musella).

horoj: 18,30-18,50 (MET). Ondolongoj: 25, 21m-31, 35m.-49,92 m.

Bonvolu raporti al RADIO ROMA Esperanto Fako-Via Veneto 56-ROMA (Italujo)

Cu vi jam sendis vian aŭskultraporton al la Katolika Radio Stacio en HILVERSUM (Nederlando) kaj ĉu vi regule aŭskultas sabatvespere je 11,15 h. ondolongo dum la 2a kvartalo de 1952 402 metroj. NEPRE NECESE!

### Subtenantaj membroj!!!

- 11 d-ro W. Solzbacher Jonkers (Usono)
12. s-ro Frank Kovarik Chicago (Usono)

NI DANKAS Kiu sekvos?

s-ro H. Peters, Willemstraat 63, HEERLEN (Nederlando) kolektas uzitajn poŝtmarkojn por la Katolika Misio. Li serioze petas alsendon por la bona celo.

s-ro Notaerts, LOT (Belgujo) posedas jam 25 katolikajn bibliojn en diversaj lingvoj. Bonvolu sendi lin aliajn. Li korespondas kun ĉiuj landoj, pri diversaj temoj, sed prefere pri la Katolika Religio kaj Maria-kulto. Li nepre respondos per belega il. pk., filatelie afrankita.